

PRI LA KULTURDOMO

Kelkaj precizigoj

Jam alvenas al ni informpetoj pri nia 1966a programo. Eĉ kelkaj ĉambroj estas rezervitaj por Pasko kaj la somero. Sed ĝis nun ni povis informi nur pri la ĝenerala kadro de la programo. Ni povas nun doni kelkajn pliajn precizigojn.

La programo de la prelegoj dum la Paska Kultura Semajno anonciĝas tre interesa. La ĝe-junuloj francaj kaj alilandaj, kaj kompreneble la pli aĝaj gesamideanoj, certe interesiĝos pri la temoj de tiuj prelegoj : « Ortografio kaj fonetiko en Esperanto » — « Kial iu Dolmeno en Baugé ? » — « Ĉar vort' estas Vorto » — « Edukado kaj toleremo » ktp. Ankaŭ okazos la kutimaj kursoj, konversacioj, ludoj, ekskurso. Kaj oni promesis al ni la partoprenon de... milda vetero !

La unua somera periodo estos, kiel anoncite, gvidata de Sro Ribot kiu instruos la superan kurson ; Fino Vazon gvidos la porkomencantan kaj la duagrada praktika kurso estos gvidata de Sino Major el Londono.

La dua periodo, Internaciaj Kulturaj kaj Turismaj Ferioj, prezentos la ĉiam plaĉajn diversajn aktivajojn. Unue, la prelegoj. Dro Bormann el Germanujo, doktoro de politikaj sciencoj, Instrukomisiito por Esperanto en la Universitato de


Hamburg, parolos pri la helpaj kaj malhelpaj faktoroj de la Eŭropa Komunumo kaj ankaŭ pri aliaj problemoj aktualaj. Aliajn temojn prezentos elstaraj samideanoj.

Dum la tria periodo oni povos sin prepari (aŭ finprepari) por la Atesto pri Lernado, la Atesto pri Supera Lernado, la Atesto pri Kapableco kaj ankaŭ, la unuan fojon, la Pedagogia Atesto. Kiel kutime la alilandanoj havos la eblecon provi la Internacian Ateston pri Kapableco.

Prof. Martin el Rennes gvidos la Studperiodon organizitan de UFE (28 aŭg.-11 sept.). Kiuj jam havis la okazon sekvi tiajn kursojn, tiuj scias kiom agrabla estas la instruo de Prof. Martin. Ankaŭ dum tiu periodo okazos komuna vizito de Anĵuo kaj Tureno.

Ni esperas ke ni baldaŭ povos sendi al ĉiuj interesatoj ankoraŭ pli precizajn informojn pri tiu programo. Ĉar ni daŭre klopodas por aldoni novajn nomojn al la listo de la prelegontoj kaj de la kursgvidontoj, kaj eĉ novajn artiklojn al la listo de la aktivajoj.

Sed ni petas, bonvolu aliĝi sufiĉe frue por ke ni rezervu por vi taŭgajn ĉambrojn.



Se vi deziras ricevi la venontan numeron de
KULTURAJ KAJEROJ

ĝustatempe

Tuj reabonu !

Abonigu viajn amikojn !

(Listo de perantoj sur la lasta kovrilo-paĝo).